

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

ĵaŭdon la 7-an de januaro 2021 per Zoom

(aprobata en la interkonsiliĝo la 25-an de februaro 2021)

Ĉeestis

Claude Rouget, Amelie Matt kaj Mario Machlik (Tromsø)

Herman Ranæs kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen (Trondheim)

Bård Hekland (Bergen)

Lars Sandbakk (Stavanger)

0. Tagordo

La tagordo estis dissendita la 4-an de januaro. La tagordo aprobiĝis.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 26-an de novembro

La malneta protokolo estis dissendita la 27-an de novembro. La protokolo aprobiĝis kun eta korekto.

Komento al la enhavo: Bård kontaktis Ulf pri la Facebook-konto de NEL, sed dume ne ricevis respondon.¹

2. Jarraporto, jarkalkulo 2020

Ni komencis redakti la jarraporton por 2020, surbaze de la raporto por 2019. Ni kune redaktis parton kaj disdividis respondecon por la unuopaj paragrafoj. Bård kontaktos Douglas pri diversaj eroj kiuj rilatas al la oficejo. Ni celas kiom eble finfari la raporton dum la venonta kunsido en februaro, sed verŝajne devos atendi iom pli longe la raportojn de la aktivaj kluboj.

Claude faros la jarkalkulon kaj prezentos ĝin en la sekva estrarkunsido.

3. Landa kongreso 2021

La landa kongreso okazos per Zoom la 5-an kaj 6-an de junio, ambaŭtage de 14:00 ĝis 17:00. Eble ni ankaŭ organizos neformalan retan kunestadon dum la vespero, ekz. de la sepa.

4. Nordia kunlaboro

Ni ne faris ion post la seminario en novembro, krom prepari diversajn raportojn por NE-isto. Decido: Mario kontaktos la svedajn kaj danajn estrarojn por neformala diskuto pri estonta agado. Ni proponas serion de retaj aranĝoj ne tre oftaj, kie la respondeco alternas inter la asocioj. NEL invitas al

¹ La 8-an de januaro Bård ricevis redaktoraĵojn.

reta seminario la 17-an de aprilo. Estis proponata kiel preleganton la prezidanton de TEJO Charlotte Scherping Larsson.

5. Nova broŝuro

Amelie prezentis proponon pri nova broŝuro. Ĝi estis laŭde ricevata. Estis kelkaj proponoj, ke eblus elekti ekzemplovortojn kiuj pli klare montras la strukturon de E-o, sed la vortoelekto dependas ankaŭ de haveblaj ilustraĵoj. Ni ankaŭ diskutis, ĉu presi la broŝuron aŭ nur elprinti kiam ekestas bezono. Decido: Amelie finfaros la fazonon kaj faros versiojn kun diversaj lokaj kontaktinformoj. Ni dissendos la broŝuron rete kaj elprintas laŭbezono.

6. Eventualaĵoj

Mario trovis en Facebook, ke en Oslo ekzistas “pop-up” restauracio nomata Esperanto. Ni povos mencii tion en nia Facebook-konto, mencii en Esperanto-Nytt kaj eble kontakti ilin por iu loka aranĝo kiam tio eblos.

Mario ankaŭ informis pri nova filmo en Netflix: Insulo de la Rozoj, kiu temas pri mallongviva «mikroŝtato» ekster Italujo, kie Esperanto estis oficiala lingvo.

Lars informis, ke Heroo el Koreujo translokiĝos de Stavanger al Liĥtenstejno. Li lastatempe ankaŭ havis kontakton kun esperantistino en Odda, kiu interesiĝas pri kontakto kun aliaj esperantoparolantoj en Norvegujo.

La interkonsiliĝo daŭris de 20:30 ĝis 22:30.

La venonta interkonsiliĝo okazos ĵaŭde la 25-an de februaro je 20:30 per Zoom.

Protokolis Bård Hekland